


Andrzej Pettyn

LA ESPERANTO-FONETIKO EN PRAKTIKO  
Elektitaj parolsonoj kune kun praktikaj ekzercoj.



Legas Andrzej Pettyn, parolisto kaj redaktoro  
de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio.

1994

## E N K O N D U K O

La kulturon de nia lingvouzo konsistigas du bazaj faktoroj: lingva korekteco kaj estetikeco de la eldiroj. Pri tio, kio estas korekta informas la Zamenhofa "Fundamento de Esperanto", la diversaj decidoj de la Akademio de Esperanto kaj kelkaj verkoj, kiujn ĝenerale oni konsideras normlibroj, kiel ekz. "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto", "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto". Aliflanke la estetikeco de la eldiroj estas afero subjektiva, kvankam ofte okazas, ke pri tiu aŭ tiu homo multaj esperantistoj diras, ke li/ŝi parolas bele, estetike. Kaj ĝuste tia pritakso de les parolmaniero devus esti pensiga. Tiam oni prikonsideru, ĉu eventuale indus sekvi tiun parolmanieron kiel imitindan modelon.

Parolante ni sekvas ne nur la postulojn de nia lingvosistemo, sed ankaŭ la postulojn de la lingvonormo. Tiun lingvonormon kutime konsistigas ĉiuj lingvorímedoj, kiuj en la koncerna momento estas aprobataj de la esperantista komunumo. En la kazo de Esperanto al la ellaboriĝado kaj fiksiĝado de la lingvonormo kontribuas diversaj verkoj, kiuj surbaze de la Zamenhofa linio de la lingvoevoluo, observado de la skriba kaj parola lingvouzo, sugestas, ke oni parolu "ne tiel, sed tiel ĉi".

Spertaj lingvouzantoj konsilas aŭ sugestas tion aŭ tion, sed nur de la ordinaraĵaj parolantoj de Esperanto dependas, ĉu en la praktiko oni sekvos ĉi tiujn konsilojn kaj sugestojn aŭ ne. La t.n. averaĝa (meza) esperantisto bone scias, ke la uzo de Esperanto estas tre malsama, precipe en la sfero de la prononcado. Por havi belan superrigardon pri tio, sufiĉas aŭskulti la salutojn aŭ salut-alparolojn de diverslandanoj dum la inaŭguroj de niaj universalaj kongresoj. Ĉu do - "malsama" samtempe signifas korekta? Allasebla? Tolerebla aŭ ne tolerebla? Kaj se tolerebla, tiam ĝis kia grado? Kie finiĝas la tolereblo kaj komenciĝas la malakceptebla fuŝado de la prononcado? Cetere, ĉu ekzistas strikte difinitaj kriterioj de bona prononcado?

La nuntempa lingvouzo laŭ la fonetika vidpunkto estas multe pli unueca ol ekzemple antaŭ la unua mondmilito. Nuntempe ekzistas pli da sonportiloj, estas disponeblaj paroladoj kaj kantoj registritaj sur sonkasetoj, sur bobenaj

sonbendoj, videobendoj, esperantlingvaj radioelsendoj, ni havas pli da personaj kontaktoj inter la esperantistoj - kaj ĉio ĉi unuecige influas la parolan lingvouzon. Kaj la etaj prononcdiferencoj, tie aŭ tie renkontataj, estas tute akcepteblaj, kondiĉe, ke ili ne kaŭzas miskomprenojn. Kaj ĝuste por eviti eventualajn miskomprenojn, mi kolektis iom da tipaj ekzemploj, kiuj montras kelkajn prononc-embuskojn. Unue mi prezentis ilin en ciklo de radioelsendoj, kadre de Pola Radio kaj poste mi surkasetigis la ciklon de ĉi tiuj elsendoj kaj nun disponigas al ĉiuj interesiĝantoj.

Finante ĉi tiun enkondukon mi volas atentigi, ke la prononcan unuecon kelkfoje rompas tiuj lingvouzantoj, kiuj pli aŭ malpli konscie transprenas kaj aplikas en E-o la prononcutimojn de sia gepatra lingvo senkonsidere al la apartaj reguloj, kiuj ja estas devigaj en la internacia lingvo Esperanto.

La plena prononc-unueco en la monda skalo verŝajne ne estas ebla kaj cetere ne estas necesa. Ni traktu la Zamenhofajn regulojn kaj la prononc-normojn elformiĝintajn dum jaroj sufiĉe liberale, akceptante la influon de niaj gepatraj lingvoj, sed samtempe ni tamen instigu niajn gesamideanojn, ke ili strebu al la maksimuma perfekteco, kaj ni avertu pri ĉiuj eblaj prononc-embuskoj, kies parton mi prezentas en ĉi tiu libreto.

Necesas substreki, ke la ideo aperigi la tutan ciklon de radioelsendoj pri prononcado en la formo de sonkasetoj naskiĝis el la sugestoj de multaj aŭskultantoj de la E-elsendoj de Pola Radio. Unue mi volis reverki la tutan kolektitan materialon, sed pro la konstanta tempomanko mi ne povis realigi la intencon. Do, mi nur iomete poluris la tekstojn, enŝovis kelkajn kromajn ekzemplojn, kiujn ĉefe disponigis al mi sinjorino Irena Łowińska, la redaktorino de la konata brajla E-revuo "Pola Stelo" (tutkoraĵo dankon!), kaj mi rebje surbendigis la materialon per mia propra voĉo, por tiamaniere plene respondeci pri la prononc-modeloj, kiujn mi kuraĝas proponi. Mi esperas, ke post ĉi tiu unua eldono de "La Esperanto-fonetiko en praktiko" sekvos pli bonaj, pli kompletaj kaj samtempe pli ĉiufankaj prezentoj de la temo. Mi ĝojos, se ĉi tiu libreto kune kun du sonkasetoj kontribuos al la plibonigo de la prononcado kaj donos praktikan helpon al tiuj gesamideanoj, en kies naciaj lingvoj mankas tiuj aŭ tiuj parol-sonoj uzataj en Esperanto,.

Ludoviko Zamenhof en siaj famaj dek ses reguloj (paragrafo 9 en la "Fundamento de Esperanto" skribis: "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita". Kiam li aperigis ĉi tiun regulon en la jaro 1887, li tamen ne antaŭvidis, ke homoj, kiuj uzas malsamajn etnajn lingvojn, povas interpreti la regulon tute malsame. La demando de korekta prononco fariĝis tre grava, kiam la lingvo forlasis la epokon de skriba uzado kaj eniris la periodon de parolaj kontaktoj. Ĉi tiu demando estis unu el la ĉefaj diskuttemoj de la ĝenerala kunsido dum la unua UK en 1905. El la raporto pri ĉi tiu kunsido aperigita en la gazeto "Lingvo Internacia" ni ekscias, ke "Estis tuŝitaj la demandoj pri neĝusta metado de la akcento sur la lastan silabon fare de francoj, pri la necesa elparolado de "aŭ" kaj "eŭ" kiel unu silabo; laŭ invito de Zamenhof sinjorino Rosa Junk deklamis "La Vojo"; post la deklamado li rimarkigis, ke "l" devas esti elparolata "plej klare, nek tro mole, nek tro malmole, sed en meza maniero". Sekvis demandoj kaj diskutoj pri la elparolo de vokaloj "e", "o", "a", pri ties longeco aŭ mallongeco. Zamenhof klarigis, ke "en Esperanto ĉiuj literoj devas esti mezaj, sekve "e" ankaŭ devas esti nek tro ferma, nek tro malfermita". Carlo Bourlet esprimis opinion, ke en kunmetitaj vortoj "estas pli facile uzi tiom da akcentoj, kiom estas da kunmetradikoj" por atingi pli klaran komprenon; ĉi tiun opinion Zamenhof aprobis. Interesa estas la opinio de Bourlet pri malgrandaj diferencetoj en la prononcado, kiuj "tute ne malhelpas la komprenon" kaj li trovas, ke "estus bedaŭrinde, se malaperus tiu rimedo rekoni la naciecon de la esperantistoj". Oni parolis ankaŭ pri la fonemoj: d, n, ĵ, r, kaj aliaj.

De post la unua UK la parola uzado de E-o pli kaj pli vastiĝis. Dum personaj kontaktoj de diversnacionoj E-o konfrontiĝis kun diversaj prononctendencoj, influataj de tiu aŭ tiu nacia lingvo kaj nacilingva parolmaniero. La Zamenhofa kabineta surpapera planlingvo kun la vastiĝo de la parola uzo iom post iom transformiĝis en plenvivantana lingvon. Samtempe la e-ista komunumo dum siaj kunvenoj pli kaj pli observis la parolmanieron de bonaj parolantoj de la lingvo. Rezulte de tio iom post iom elformiĝis sufiĉe unueca, vere internacia prononc-modelo, kiu - kvankam ĝi baziĝas sur la Zamenhofa regulo el 1887 - estas tamen preskaŭ tute libera de la fonetikaj kateĵoj de la gepatraj lingvoj de la parolantoj. Kaj do - oni po-

vas diri, ke kreiĝis iaspeca prononcnormo, kiun ankoraŭ ne sankciigis la Akademio de Esperanto, sed ĝi jam funkcias en la praktiko. Mi kredas, ke Pola Radio per siaj ĉiutagaj Esperanto-elsendoj, aŭdigataj jam 35 jarojn konsiderinde kontribuis al la ellaboriĝo de ĉi tiu internacia prononcnormo, i.a. per la ofta aŭdigado de intervjuoj kun personoj, kies parolmanieron oni nomas modela.

## 2

Unu el la bazaj kriterioj de bona prononco en Esperanto estas ĝia facila komprenebleco por parolantoj de diversaj etnaj lingvoj. Se la prononcmankado ebligas facilan interkompreniĝadon sen miskomprenoj, se ĝi ne naskas konfuzon, tiam oni povas konstati, ke ĉi tio estas tre esenca kaj grava. Dum universalaj kongresoj aŭ aliaj e-istaj konferencoj internaciaj ni ofte renkontas homojn, kiuj estas influataj de naci-lingva prononcmankado, sed se ni povas interkompreniĝi kun ili relative facile kaj se ne sekvas miskomprenoj, tiam la prononcmankado estas tute akceptebla. Kaj do tre grava kriterio de bonan prononco estas observado de la fonologia karaktero de E-o. Ja estas diferenco inter "ruŝa samideano" kaj "ruza samideano", inter "kruĉo" kaj "kruĉo", "bisi" kaj "pisi", "legi" kaj "leki", ktp.

Plej ofte la malobservado de la fonologia karaktero de Esperanto fontas el la fakto, ke la parolanto ne povas liberigi sin el la influo de sia gepatra lingvo, de loka (dialekta) prononcmankado ktp. Kelkfoje ne povante subigi sin al la reguloj de la fonologio de E-o oni eĉ provas tie kaj tie lanĉi la opinion, ke tio aŭ tio estas permesebla. Ekz. la voĉasimilo. Waringhien kaj Kalocsay en "La PLeno Analiza Gramatiko de Esperanto" asertas, ke "ĉe senpera sinsekvo" de konsonantoj voĉa kaj senvoĉa, neevitebla estas la sonkonformiĝo de unu el ili. Kaj tiam oni prononcas "absolute" kiel "apsolute", "okdek" kiel "ogdek", "longtempe" kiel "lonktempe" ktp. Teorie - skribas Kalocsay/Waringhien - oni povas tion kondamni, sed la postuloj de la parolorganoj estas pli potencaj ol la teorio". Aliflanke la konata aŭtoro de lernolibroj H. Sepik (estono) en sia "La tuta Esperanto" asertas, ke "en la vortoj "absolute, absurda, obtuza, ekzemplo, ekzisti k.a. bs kaj bt devus esti alparolataj kun la sama b kiel en "sabato" kaj "abdiki", kz kun la sama k kiel en "akra". Sed tio estas malfacila kaj kontraŭnatura. Tial ni diras kiel en aliaj lingvoj "apsolute, apsurdo, optuza, egzemplo, egzisti". Sed en kunmetitaj vortoj kaj post prefikso ek ili kompreneble konservas si-

an originan prononcon: korbtenilo, trabsigno, ekzumi." Komentante ĉi tion Atanas Atanasov en la libro "La lingva esenco de Esperanto" konstatas, ke "klera parolanto konsideros la apartajn konsistajn partojn de la kunmetita vorto kaj evitos prononci ng kiel nk kaj vs kiel fs." Prof. John Wells en la libro "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" (aĉetebla ĉe UEA) pri la sama fenomeno konstatis: "En Esperanto ĝi povas konduki al miskomprenoj nur en vere malmultaj kazoj (subtaso - suptaso), do eble estu tolerata - sed ne rekomendinda, precipe por angloj kaj por aliaj, kiuj devus aparte lerni fari ĝin." Jes, la voĉasimilo ne estu rekomendinda. Ekz. en la pola lingvo ĝi ekzistas, sed parolante en E-o mi mem ĉiam klopodas eviti ĝin, por ke mia prononco estu maksimume perfekta. Do, mi ne diras "mond/t/milito", sed tute klare "mondmilito", ĉar ne temas pri milito en montaro, sed pri mondmilito, do monda milito.

Fine mi ankoraŭ substreku, ke ekzistas ankaŭ estetika kriterio. Pri kelkaj homoj oni diras, ke en E-o ili ne nur prononcas korekte, ke ili parolas klare, sed ankaŭ bele, agrable por la oreloj de aŭskultantoj. Kvankam tio estas subjektiva afero, sed se la subjektivan opinion prezentas multaj personoj, tiam ĝi fariĝas ĝenerala opinio. Ni klopodu paroli klare kaj bele, alivorte -estetike!

### 3

En mia antaŭa radioelsendo pri prononcado mi i.a. parolis pri kelkaj kriterioj de bona prononcado, pri miskomprenoj aŭ konfuzoj, kiujn povas kaŭzi malĝusta elparolo de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj aŭ voĉasimilo. Tiam miskomprenon aŭ konfuzon miaopinie ne povas kaŭzi longa aŭ mallonga, vasta aŭ malvasta elparolado de vokaloj, ekz. depende de tio, ĉu ili estas fermitaj aŭ ne. La malsama elparolado de vokaloj fare de diversnacianoj donas al E-o iom da koloro ne kaŭzante miskomprenon kaj ni ne kontraŭbatalu ĉi tion. Ĉu ni diros "be-la" aŭ "be:la" (longa e), "ho-mo" aŭ "ho-mo", ne gravas. Neniu miskomprenos nin. En PAG Kalocsay/Waringhien skribis: "... la egallonga prononco de ĉiuj vokaloj estigas malagrablan, abruptan, maŝinpafilmanieran prononcon kaj konfuzas la aŭdanton, nekutimiĝintan al tia parolvetskuro. La longaj akcentaj vokaloj donas eblon, ke oni ripozu sur ili kaj malrapidigu la fluson de la parolo je certaj vari-ritme alternantaj distancoj." Mi ne samopiniis pri tio - kiel multjara observanto de la parola lingvouzo de diversnacianoj - verŝajne Kalocsay/Waringhien

formulis ĉi tion sub la influo de sia gepatra lingvo (la hungara aŭ la franca?), ŝajnas, ke precipe en la hungara lingvo la ekzistas granda varieco de vokal-elparolo. Mi mem elparolas la vokalojn egallonge, meze (laŭ la konsilo de Zamenhof), iafoje nur iom pli longe ĉe la silaboj finiĝantaj per vokalo, ekz. ka-ru-lo, mal-no-va, vorta-ro ktp. Sed ĉi tiun "mezan" elparolmanieron neniu ĝis nun riproĉis al mi.

Mi devas konfesi, ke iam mi elparolis n kiel la palatan n, ekz. oni, sed mi lernis kaj nun mi ĉiam elparolas on-l (sen la moligo renkontebla ĉe multaj poloj). Same iam mi senvoĉigis la finaĵojn de voĉaj konsonantoj, ekz. set (sed), sed mi ellernis la regulon kaj mi ne plu senvoĉigas la konsonantojn ĉiam elparolante ilin precize. (ekz. sed). Do, se oni scias pri la afero, aŭ oni disponas pri bona prononcmodelo, ekz. sonbende registrita, oni povas ellerni ĉion. La tasko estas pli malfacila por tiuj personoj, en kies gepatra lingvo ne ekzistas iuj parolsonoj, ekz. ŝ, ĉ, ĵ, ĝ, ĥ-h, l. ĉi-lastan ekzemple ĉinoj aŭ japanoj elparolas kiel "r", Sed ankaŭ ĉi tion oni povas ellerni. Ne ĉiuj distingas inter la voĉa kaj senvoĉa "h-ĥ". Sed tio estas bagatelaĵo, ĉar el ĉi tiu eta misprononco ne povas rezulti konfuzo. Necesas tamen, ke entute oni elparolu "h", sendepende de tio, ĉu ĝi estas voĉa aŭ senvoĉa. Tiu postulo pri h-elparolo precipe en la vort-komenco estas aparte memorinda de francoj. Certe kelkaj parolsonoj estas por iuj esperantistoj iom malfacilaj por korekta elparolo. Sed malfacila ne signifas malebla! Kelkfoje estas necesaj multaj ekzercoj sub la gvido de sperta parolanto aŭ ekzercoj per la uzo de sonbende registritaj modeloj por finfine akiri bonan prononcmanon. Jes, certe, eraroj en la prononcado estas neeviteblaj, sed se la koncerna homo konscias pri siaj misprononcoj, li/ŝi certe atentós pri tio. Malpli bone estas, kiam la instruisto mem en la kurso por komencantoj ne atentigas pri prononceraroj, li/ŝi ne konscias, ke li/ŝi mem faras ilin, ĉar ti-am kutime sekvas katastrofo, rezulte de kiu ĉiuj gelernantoj misprononcas same kiel la instruisto, kiu por ili estas modelo. Feliĉe nuntempe oni ne vivas en izoliteco, aperas pli kaj pli da sonkasetoj kaj sondiskoj kun kantata aŭ parolata E-o, ekzistas esperantlingvaj radioelsendoj, okazas kongresoj kaj internaciaj kunvenoj, en kies kadro parolas bonaj, vere modelaj lingvouzantoj. Do, nova e-isto - se li/ŝi ne ellernis de la komenco la vere internacian prononcmanon - li/ŝi rapide rimarkas, li/ŝi prononcas malkiel aliaj e-istoj kaj li/ŝi klopodas subigi sin al la ĝenerala prononcmodelo.

Fakte jam en la 1964-a jaro dum la universala kongreso en Hago la Akademio de Esperanto pritraktis la proponon de profesoro Stóp-Bowitz pri la starigo de oficiala prononcnormo, sed post longa diskutado oni rezignis pri tio. Antaŭ nelonge akademiano Bernard Golden denove prezentis la problemon, sed per tio finiĝis la afero. Ni tamen esperu, ke tia prononcnormo iam aperos.

4

Al iom malfacilaj apartenas la parolsonoj "s" kaj "z". Precipe malfacila estas "z", ĉar en kelkaj lingvoj ĝi entute ne ekzistas. "S" estas trovebla en multaj vaste uzataj vortoj.

Aŭskultu kaj ripetu: sana, , seka, taŝo, paŝi , etoso, glaŝo, skatolo, ŝpaco, ŝpeco, ŝomero, ŝpegulo, veŝto, liŝto , eŝti.

Iuj personoj havas malfacilaĵojn, kiam du "s"-oj aperas en la sama vorto, ekz. sukceso.

Aŭskultu kaj ripetu: sukceso, superŝtiĉo, sugesti, susuri, ŝuspekti, ŝolisto, ŝistemo.

Iafoje ĉe kelkaj personoj oni rimarkas malfacilaĵon, kiam en la sama vorto aperas kaj "s" kaj la voĉa "z", ekz. ŝupozi.

Aŭskultu kaj ripetu: ŝupozi, ŝurprizi, ŝintezo , ŝezono, ŝpezo ŝimpozio, ŝkizi.

Jen en ĉi tiuj vortoj anstataŭ klara elparolo de unue "s" (ŝintezo ) kaj poste "z" (ŝintezo), ofte oni aŭdas la eraran elparolon "ŝinteso aŭ zinteso". Ĝi ĉe iuj personoj estas trovebla "zintezo". Do nepre memoru ĉiam klare elparoli: ŝupozi, ŝurprizi, ktp.

Mi aparte atentigas pri la senvoĉa "s" en la komenco de multaj vortoj. Oni ĉiam elparolu ĝin kiel "so", neniam kiel "zo", kion anoj de kelkaj nacioj ofte faras.

Aŭskultu kaj ripetu: ŝupozi, ŝurprizi.

Kial la korekta elparolo de "so" kaj "zo" estas tiom grava? La afero estas simpla, se vi elparolas malkorekte, vi povas ja tute facile misŝanĝi la signifon de via frazo. Aŭskultu frazon kaj provu rimarki la diferencojn:

"La virino admiris en la ĝardeno rozon, sed ŝi ankaŭ povis admiri rozon, aŭ ambaŭ - "ŝi admiris rozon sur la rozo". Tamen por esprimi la diferencon oni devas klare elparoli ambaŭ parolsonojn.

Kaj nun aŭskultu iom strangan tekston, kiun mi prezentas nur ekzercacele kaj provu ripeti ĝin post mi:



Ŝi suferis sola en silento de siringoplena sovaĝejo forgesinte pri la stranga societo. Sed jen aperis subita siblo. Evidentiĝis, ke siringo eksusuris sojle de somero sentigante siajn strangajn sorĉaĵojn.

Vere stranga teksto, ĉu ne? Sed nepre reaŝkultu ĝin kaj provu ripeti sekvante mian modelon.

5

Laŭvice ni iom parolu pri la iom malfacila "z", malfacila, ĉar e-istoj devenantaj el kelkaj landoj ofte miksas "s" kaj "z".

La konsonanto "z" aperas en kelkaj bone konataj vortoj. Aŝskultu kaj ripetu: valizo, vazo, ĵazo, ĉemizo, muziko " , "zipo" , "amuza, serioza, skizi, okazi, analizi, koncize, precize.

Erara prononco de la voĉa "z" estas ofte trovebla en tiuj vortoj, en kiuj samtempe aperas la senvoĉa "s", ekz. sezono. Aŝskultu kaj ripetu: sezono, simbiozo, spezo, supozi, skizi, sintezo, ekzisti.

En antaŭa ĉapitro mi menciis, ke malĝusta elparolo povas tute ŝanĝi la signifon de iu vorto aŭ frazo, iafaje oni povas eĉ ofendi iun, se ekz. anstataŭ diri "nia rusa samideano", ni diros "nia ruza samideano", do - rusa , ruza, ruŝo - ruzo.

Simila miskompreno povas aperi, kiam ekz. iu diros, ke li/ŝi volas manĝi piŝon, anstataŭ diri "pizon". Simile - "meso - mezo".

Se iu volas klare komuniki "mi eliris el la preĝejo en la mezo de la meso" oni devas klare distingi inter "meso" kaj "mezo".

Ŝimilaj opoziciaj parolsonoj estas en E-o sufiĉe multaj: ekz. klare diru "prezlisto", ĉar "preslisto" havas tute alian signifon. Nepre memoru, ke estas sufiĉe granda diferenco inter "deserto" kaj "dezerto". Plej granda problemo povas aperi, kiam oni emos "manĝi deserton sur dezerto."

Aŝskultu la ripetu: roŝo - rozo, rusa - ruza, raso - razo pesi - pezi.

Jen iom stranga interparolo, en kiu la diferencigo inter so kaj zo estas sufiĉe grava:

- Kiom vi pezas? - demandis min ruza rusa samideano en la mezo de la meso.

- Mi ankoraŭ ne pesis min, do mi ne scias mian pezon.

Ĉu vi bone komprenas la diferencon inter...?

prezo de preso, laso de lazo, gazo en gaso, rezono post reŝono ?

6

Nun venis vico por la parolsono "ŝ" (ŝo), kiu por kelkaj personoj estas tute facila, por kelkaj ege malfacila. En plej malbona situacio estas tiuj personoj, kiu eĉ ne scias pri tio, ke ili malbone elparolas ĉi tiun konsonanton. La parolsono "ŝ" troviĝas ekzemple en la vortoj: depeŝo, tapiŝo.

Aŭskultu kaj ripetu: fiŝo, buŝo, gejŝo, ŝako, freŝa, ŝika, ŝteli, ŝpari, kaŝi.

Mi rimarkis, ke ĝi estas pli malfacile elparolebla, kiam en la sama vorto aperas "c", ekzemple "ŝpruci", "ŝmaci".

Aŭskultu kaj ripetu: ŝerci, ŝpruci, ŝmaci.

Mi mem devas tre zorgeme streĉi miajn buŝmuskolojn por klare diri "ŝerci" kaj se krome aldoniĝas sufiksoj, tiam eĉ mi mem sentas min embarasita.

Aŭskultu kaj ripetu: ŝercaĵo, ŝprucaĵo, ŝprucigi.

Ankaŭ estas iom da malfacilo, kiam samtempe kuniĝas en la sama vorto "ŝo" kaj ekz. "ĝo", ekz. ŝanceli - ŝanceliĝi.

Aŭskultu kaj ripetu: ŝanceli - ŝanceliĝi, ŝiri - ŝiriĝi, kuŝi, - kuŝiĝi.

Simile malfacila por elparolo fariĝas la kuniĝo de "ŝ" kaj "s", ekz. ŝlosi.

Oni ne miksu "ŝo" kun "so". Ja estas tute evidenta diferenco inter "muŝo" kaj "muso". Inter "puŝo" kaj "puso". Inter "tuŝo" kaj "tuso".

Neniam oni miksu la parolsonon "ŝ" kun "ĵ".

En kelkaj lingvoj, ekz. en la finna, "ŝo" entute ne ekzistas, escepte de kelkaj fremdvortoj, kiujn oni kutimas prononci tute laŭ la propra plaĉo, ekz. ŝejko, ŝako.

Aŭskultu iom strangan frazon kun multaj ŝo, so, ĵo: Ĉarma gejŝo duŝis sin kaj poste manĝis freŝan fiŝaĵon kaj gulaŝon, Sekve ŝi viŝis la buŝon kaj fine ŝerce ŝanceliĝante ŝi ŝovis sin rapidpaŝe antaŭen. Kia fuŝaĵo! Jen maŝo en la ŝtrumpŝiraĵo.

(9)

En la sekva ĉapitreto ni prezentas la parolsonon "ĵ", kiu ekzistas en multaj lingvoj, sed skribe oni montras ĝin per aliaj literoj ol en E-o. Ekzemple en la pola lingvo oni skribas "ż" kun punkto super la litero "z" (ż).

La parolsono "ĵ" ekzistas en multaj vortoj, ekz. en "ĵazo". Aŭskultu kaj ripetu: ĵazo, ĵargono, ĵetono, ĵaŭdo, pakaĵo, ĵaketo, ĵaluza, aĵura, ĵeti, ĵuri, ruĵo, ktp.

Ĉi tiu parolsono ekzistas ankaŭ en la vorto "ĵus", kiu signifas "antaŭ momento". Bedaŭrinde en multaj landoj oni ne diras "ĵus", sed sufiĉe ofte "ĝus". Mi substrekas, ke en E-o ne ekzistas "ĝus"! Aliflanke ekzistas "ĝuste", sed ĝi havas tute alian signifon. Iuj e-istoj anstataŭ diri "ĵus", elparolas "jus" aŭ "just" kaj tio ankaŭ estas malkorekta. Oni do klare elparolu ĵ, ĵus.

Oni ne miksu "ĵ" kun "ŝ". Oni klare rimarku la diferencon inter ekzemple "ruĵo" kaj "ruŝo". Cetere ĉiuj verŝajne scias, ke "ruĵo" estas "ruĝiga ŝminko" kaj "ruŝo" estas "plisita surkudraĵo, strio surkudrita surrobe, plej ofte farita el tulo, punto aŭ fajna tolo, ofte kolora, ŝatata de virinoj kaj ankaŭ de infanoj. Do, ruĵo estas uzata por kolorigi lipojn kaj ruŝo - por ornamu bluzon aŭ pantalonon.

## 7

Laŭvice mi volas prezenti al vi la parolsonon "c". Ĝi estas sufiĉe facila por multaj personoj. Ni ekz. trovas ĝin en la vortoj: laca, malica.

Aŭskultu kaj ripetu: certa, pajaco, kruco, eco, polico, surfaco.

Malfacilaĵoj aperas kutime tiam, kiam "c" najbaras en la sama vorto kun aliaj malfacilaj parolsonoj, ekz. ŝ, ĵ, ktp.

Aŭskultu kaj ripetu: ŝprucaĵo, spicaĵo, ŝmaci.

En kelkaj landoj sub la influo de la propra nacia lingvo de la parolanto oni miksas c kun s. Anstataŭ "poliso" oni emas diri "polico", pli ofte tamen estas inverse. Sed ĵa "poliso" havas nenioŝ komunan kun la gardistoj de la publika ordo (polico), sed "poliso" estas dokumento atestanta pri asekuro. Neniam polico donas polison, sed ĉi tion kutime faras asekura kompanio.

Estas kelkaj kuriozaj e-istoj, kiuj miksas "c" kun "ĉ". Mi mem konas tian samideanon. Li ne diras "sencele", sed senĉe-

le. Li ne diras "certe", sed "ĉerte". Certe (ne ĉerte!) li al-  
kutimiĝis al tio en la komenco de la lernado, neniu atentigis  
lin pri tiu prononceraro. Mi mem ne kuraĝis fari tion, ĉar mi  
ne volis lin ofendi. Feliĉe li ne estas instruisto de E-o.

Krome oni ne miksu "c" kun "s", ekz. kaĉo havas nenion  
komunan kun kaŝo, kruco - kun kruĉo. Mi lasas la laboron, ĉar  
mi lacas pro la laboro.

Fine - oni ne miksu la vorton "edzo" kun "eco", ĉar eble  
iam oni devus diri, ke "la plej grava eco de la karaktero de  
mia edzo estas akurateco kaj komplezemo."

Mi spicis miajn citaĵojn per iom kaprica ezemploŝprucaĵo  
kaj mi lasas vin espereble senlacaĵ.

## 8

Aparte malfacile elparolebla estas la kombinaĵo de s kun  
c, kiam ili troviĝas unu apud la alia. Ekzemple - scienco,  
sciuro, scivola.

Aŭskultu kaj ripetu: scii, sceptro, scienco, sciencisto, ekscii,  
fascino, fascini, konscii, konscienco, konscienciproĉoj,  
lasciva.

Aŭskultu iom strangan frazon: Scivolema sciencisto ne sci-  
is, ke sciuro kaŝis sin en scirpo.

## 9

La parolsono "ĉ" troviĝas en tre multaj vortoj, ekz.  
kaĉo, skeĉo, voĉo.

Aŭskultu kaj ripetu: kruĉo, feliĉa, riĉa, ĉasta, suĉi, sandviĉo,  
breĉo, kaĉo.

La elparolo de ĉi tiu konsonanto estas eĉ pli malfacila en  
la vortoj, en kiuj ĝi samtempe apudas kun "ĝ", ekz. "ĉantaĝi".  
Aŭskultu kaj ripetu: ĉantaĝi, ĉagreniĝi, streĉiĝi.

Kaj fakte ne estas mirige, ke ĉ oni iafoje erare miksas  
kun ĝo. Sed tiam tute ŝanĝiĝas la signifo! Ja "aĉa viro" es-  
tas io negativa, dum "aĝa viro" signifas ion alian. Klare el-  
parolu "aĉa aĝulo"! Simile "Plaĝo" kaj "plaĉo". Leĝo estas ju-  
ra akto, dum leĉo estas bulgara aŭ hungara manĝaĵo farita  
el kapsikoj, tomatoj, ktp.

Verŝajne por eviti konfuzon inter "maĉo" - ago de tiu, kiu  
maĉas dispremante ion inter la lango kaj la dentoj, kaj la  
sporta konkurso - oni komencis uzi "matĉo".

lafoje oni miksas ĉ kun c, precipe fars ĉi tion homoj el tiuj nacioj, en kies gepatra lingvo ne ekzistas ĉ. Ja estas diferenco inter "laĉo", ŝnureto por ekzemple kunligi du vestopartojn aŭ fiksi ŝuojn, kaj "laco".

Do nepre ekzercu la uzon de ĉi tiu parolsono kaj dume aŭskultu laŭvican strangan frazon; fakte ĉi-foje estos pli ol unu frazo:

La feliĉa sorĉisto ĉagreniĝis manĝante kaĉon en kaĝo troviĝanta ĉe plaĉa plaĝo. Dume la aĝa, sed aĉa ĉarlatano senĉese ĉantaĝis ĉiujn en la ĉirkaŭaĝo. Ne ĉagreniĝu - diris la sorĉisto - mi faros sorĉaĝon por senstreĉe ĉesigi la malĉastaĝon. Pri ĉio ĉi oni parolos sen superstiĉoj laŭ senriproĉa ĉasteco en la voĉo sen streĉa elĉerpiteco.

10

La konsonanton "ĝ" oni trovas ekzemple en la vortoj: kaĝo, sovaĝa, vojaĝi.

Aŭskultu kaj ripetu: aĝo, seĝo, leĝo, vizaĝo, kuraĝa, preĝi, ĝeni, ĝui, ĝi, ĝis.

Se temas pri la embuskoj de la prononcado, ankaŭ en la kazo de ĉi tiu parolsono tiaj ekzistas. Ekzemple oni povas miksi ĝin (la parolsonon ĝ) kun ĉ. Miskomprenojn povas kaŭzi vortparoj, en kiuj (en unu el ili) troviĝas opozicia konsonanto aĝo kaj aĉo, plaĝo kaj plaĉo, kaĝo kaj kaĉo. Kaĉo estas manĝaĝo, kiu havas la aspekton de mola pasto, kutime oni faras el ĝi ion por manĝi. Ekz. oni faras ĝin el faruno aŭ avenflokaj kaj oni manĝas ĝin kune kun lakto aŭ fruktoj. Dume kaĝo estas fermita ujo el metalaj aŭ lignaj bastonetoj por teni en ĝi birdojn aŭ aliajn estaĝojn, kutime bestojn aŭ birdojn. Domaĉo estas kadukiĝinta domo, eluziĝinta aŭ malbelaspekta kaj domaĝo estas perdo aŭ difekto, kiun oni preferus ne sperti.

La parolsono ĝ ofte aperas en la vortoj kun la sufikso -iĝ, ekz. sensovaĝiĝi.

Aŭskultu etan tekston kaj eventuale provu ĝin ripeti. Unue tamen aŭskultu min kaj nur pli poste ripetu:

Unu el la sensovaĝiĝintaj ĝirafoj havis ĝibaĝon, kiun oni forigis per masaĝo sur plaĝo. Tio ne estas avantaĝo - ĝemante ĝojkriis ĝirafo fuĝante el la ĝardeno en la sovaĝan ĝangalon.

Komprenoble tiaj stultaj frazoj ne aperas en la ordinaraj ĉiutagaj konversacioj, tio estis nur specimeno aŭ ekzerco, Do, ne timu, ke vi iam devos fronti tiajn problemojn.

(12)

En la sekva ĉapitreto mi prezentos al vi la parolsonon "ro", kiu estas multe pli facila ol kelkaj aliaj, almenaŭ por eŭropanoj, ĉar ĝi troviĝas en la fonologia sistemo de multaj lingvoj.

Ni aŭskultu kaj ripetu: aro, najbaro, dolaro, eraro, rano, reala, rapida, regi, rigardi.

La parolsono "ro" ĉe kelkaj personoj povas miksiĝi kun "lo", precipe, kiam la du parolsonoj "ro" kaj "lo" aperas en la sama vorto; klopodu do korekte elparoli ĝin.

Aŭskultu kaj ripetu: koloro, libera, kulero, liro, solidara, to-leri, ktp.

Kelkfoje en kunmetaĵoj, en kiuj la unua elemento finiĝas per "ro" kaj la alia komenciĝas per "ro", iuj parolantoj emas engluti unu "ro"-n, tio ne estas rekomendinda, do ekz. klare elparolu: superruzi, superrapida, sur-rele.

Mi menciis pri la miksado de "ro" kaj "lo". Tio povas kaŭzi miskomprenojn, pro tio necesas elparoli la du parolsonojn tre klare. Ja estas diferenco inter "sablo" kaj "sabro", "falo" kaj "faro", "varo" kaj Valo", "malo" kaj Maro".

Aŭskultu: Georgo staris sur sablo kun sabro enmane.

La maro ŝajnis esti fora, sed tio estis malo, ĉar eble li estis fola. Kun miro li ekpensis pri milo da veloj, kvankam tio ne estis vero. En la koro kaj sur la kolo io kvazaŭ bolis aŭ lian koron boris. Li estis pala pro para varo en valo. "Mi ne voras, ĉar mi ne volas!" - li ekpensis fine.

Kiam mi parolis pri la konsonanto "ro", mi menciis, ke ĝi iafoje miksiĝas kun "lo". Jes, tial nun venis vico por iom paroli pri "lo". Por eŭropanoj ĝi estas sufiĉe facila, sed ne por azianoj. Ekz. ne ĉiu japano kapablas diri "bela lando Pollando." Ofte oni diras "bera rando Porrando". Sed tio estas tute alia afero, ĉu ne?

Aŭskultu kaj ripetu: balo , ŝalo, egala, utila , longa, fidela, babilo, luli, ktp.

Surbaze de miaj observoj mi tamen povas konstati, ke iuj eŭropanoj frontas malfacilaĵojn, kiam en la sama vorto aperas unue ro kaj poste lo, ekz. kirli, aŭ eĉ pli malfacila "lirli".

Aŭskultu kaj ripetu: merlo, perlo, hurli, pluralo, mitralo.

Sed tamen ĉi tiu malfacilaĵo aperas nur ĉe malmultaj personoj kaj ĝi estas facile evitebla post ioma ekzercado, kion mi rekomendas fari.

Denove mi devas atentigi pri la aperanta tendenco al mik-sado de la du parolsonoj "ro" kaj "lo". Se iu junulino diros: "Mi enamiĝis al tiu uro". anstataŭ diri "Mi enamiĝis al tiu ulo." - tiam eĉ oni povas iun ofendi.

Mi trovis sufiĉe multe da vortparoj, kiuj pro eventuala malĝusta elparolo povas vekti konfuzon, ekz. anaroj (an-ar-oj) kaj analoj (rakonto de historiaj faktoj, jaro post jaro), velo kaj vero, nu kaj nur, calo kaj caro, selo kaj sero, pilo kaj piro, molo kaj moro, stalo kaj staro.

Aŭskultu kaj ripetu: luli, lirli, ululi.

Aŭskultu kaj ripetu: loko por roko, rango de lango, kuro de kulo, rito de lito, ribelo por libero, rando de lando, legalo de regalo, fraŭlo en flaŭro.

### 13

Laŭvica konsonanto, kiun mi deziras prezenti al vi estas "ko". La konsonanto "ko" estas relative facile prononcebla por diversnaciaĵoj. Ni trovas ĝin ekzemple en la vortoj: kajako, kaj, akto, kakto, dek.

Aŭskultu kaj ripetu: hamako, konjako, kaliko, ek, nek, ke, ok, kuko, kapo.

Unu el la malfacile elparoleblaj Ko-vortoj estas "konscienco", sed ne pro "ko". La malfacilon kaŭzas la apudeco de sc. Aŭskultu kaj ripetu: konscienco, konscii, konscienciproĉo.

Verŝajne la sola malfacilo en la elparolo de "ko" estas ti-am, kiam en la sama vorto aperas la opozicia "go", ekz. keglo, kuglo.

Aŭskultu kaj ripetu: keglo, kuglo.

lafoje la konsonanton "ko" oni miksas kun "go", kio estas tamen malrekomendinda. Kial? Jen tial, ke tiam ŝanĝiĝas la signifo de la koncerna vorto, ekzemple: fako - fago, flako - flago.

Aŭskultu kaj ripetu: vaki - vagi, fako - fago, sako - sago, lako - lago, frako - frago.

Anstataŭ demandi "Ĉu vi ŝatas manĝi frakojn?" demandu korekte "Ĉu vi ŝatas manĝi fragojn?" Ja oni manĝas nur fragojn, sed ne niam frakojn. Do, refoje vi vidas, kiom gravega estas la korekta

prononcado.

Aŭskultu kaj ripetu: peko de pego, grizo de krizo, pago por pa-ko, gazeto sur kaseto, gaso en kaso.

14

Laŭvice ni dediĉu iom da atento al la parolsono "go", kiu estas iom malfacila, ĉar ne en ĉiu lingvo ĝi ekzistas.

Ni aŭskultu kaj ripetu kelkajn vortojn, en kiuj ĝi aperas: sago, tago, guto, glaso, gasto, gaja, grava, legi, gajni, gladi, gustumi.

Kiel vi jam rimarkis en la antaŭa ĉapitreto, la plej granda problemo en la elparolado de "go" konsistas en tio, ke sufiĉe ofte oni miksas ĝin kun "ko", kaj iafoje eĉ tute ne konsciante tion, oni elparolas "go" kiel "ko"-n, ĉar la parolorganoj de parolanto ne kapablas fari tion korekte.

Ekzemple "liki" signifas: "tralasi likvaĵon, enlasi akvon" kaj "ligi" signifas: "fiksi, kunigi". Oni povas elpafi "sagon", kiun oni kunportis en sako. Verŝajne ne interesas nin peko de pego, aŭ "gasto el alia kasto". Kompreneble pri gustoj oni ne diskutu.

Se iu ŝatas figojn, tiu persono devus tre zorgeme elparoli "go", precipe en Germanio!, sed ja ankaŭ iu alilanda e-isto eble "ŝatas fikojn". Terkulturisto "plugas kampon", dum en arbaro tre ofte oni povas "pluki fungojn". Sed ĝenerale oni ne plugas fungojn!

Aŭskultu kaj ripetu: anstataŭ legi li komencis leki, piko de pi-go, diko de digo, gajo sur kajo, vagi kaj vaki, logi kaj loki, pagi kaj paki, flago en flako, plago kaj plako, lako en lago, kanto pri ganto, manko de mango, karbo ĉe garbo.

Kaj iom malfacila kaj samtempe stranga frazo; aŭskultu kaj poste mem provu tralegi du-tri-foje:

Sur Kreto loka greko kaj lia grego staris kun mieno gaja sur vojeto kaja. La kreta greko logis la gregon, li logis ĝin, finfine allogis kaj lokis sur dika digo.

Fakte estis pli ol unu frazo, sed la teksto klare montras, kiom da miskomprenoj povas aperi, kiam oni malkorekte elparolas la unuopajn parolsonojn.

15

Al tute facilaj apartenas la konsonanto "to". Ni aŭskultu kelkajn ekzemplajn vortojn, en kiuj ĝi troviĝas: kato, bato, frato, strato, guto, monato, teatro, glata, sata, tuta, diskreta, monto ktp.

(15)



La konsonanto "to" fariĝas malfacila, kiam en la sama vorto troviĝas la opozicia: "do", ekz.

"teda", nepre elparolu "teda". Aliaj ekzemploj: trudi, Tadeo. Alia ekzemplo: trado. "Tradi" - kiel informas PIV - laŭofice forpreni havaĵon de ŝuldanto kaj doni ĝin al kreditoro en posedon". Do elparolu: "tradi".

Laŭ mia multjara observado de la parolata Esperanto en prelegoj, paroladoj, precipe dumkongresaj, kaj en intervjuoj, kiujn mi surbendigis, mi rimarkis, ke oni emas (tute senkonscie) senvoĉigi "do", en la vortoj, en kiuj troviĝas samtempe "to", ekz.: erudito, mediti, kredito, diskrediti, bandito, sacerdoto, kandidate sindikato, prestidigiti.

Prof. Ivo Lapenna ofte menciis frazon, kiu montras kiel mikso de du parolonoj povas ŝanĝi la enhavon. Jen ĉi tiu frazo: "La gejunuloj vivis en tendoj, sed ili ne vivis en tentoj." Sed povas esti, ke iajoje ili vivas en tendoj kaj en tentoj!

Neniam vendu venton, fridu friton, pentu pendon.

Aŭskultu kaj ripetu: graveto de gravedo, ardo por arto, atento dum atento, rato sur rado.

## 16

Ni dediĉu iom da atento al la konsonanto "do". Jen kelkaj vortoj, en kiuj ĝi troviĝas: kompreneble aŭskultu kaj ripetu: pado, invado, ledo, plejdo,  piedo, sudo, modo, epizodo, metodo, acida, graveda.

Por iuj parolantoj de E-o malfacile prononcebla estas la duobla "do", ekz. dekado.

Aŭskultu kaj ripetu: vendredo, dediĉi, dedukti, dekadenco, demandi, dando.

Atenton! dekadado signifas - tagdeko (tio estas neologismo).

Sed la ĵus menciita malfacilaĵo estas vere bagatela kompare kun tiu, kiun kaŭzas la samtempa apero de la voĉa "do" kaj senvoĉa "fo", ekz. fidi. (fi-di)

Tiam sufiĉe ofte "do" senvoĉiĝas, kion oni nepre evitu.

Aŭskultu kaj ripetu: fi-di, kon-fi-di, per-fi-di.

En viaj interparoloj evitu la mikسادon de krado kaj krato, grado kaj grato, vado kaj vato, lado kaj lato.

Aŭskultu kaj ripetu: pato sur pado, beto sur bedo, plado kaj plato, tigo sur digo, dubo pro tubo, lavendo en la vento, brido

de brito, lato en lado.

Jen iom malfacila kaj samtempe stranga teksto:

Vi ne rajtas rajdi dum vi ŝakludas, nek uzi paton sur pado. Kion vi faros, se vi ekvidos raton sur rado dum ĝi estas manĝanta beton prenitane el bedo. Ufff! Feliĉe vi povas tiam fuĝi en budon apud puto, kie sekvos rido pro ĉi tiu rito. Ufff!

17

Venis vico por la konsonantoj "no" kaj "mo". Ni trovas ilin en la vortoj; unue "no" - plano, infano, anteno.

Aŭskultu kaj ripetu: dogano, vana, nova, necesa, danci, naski.

La konsonanton "mo" ni trovas ekzemple en: temo, limo, fama, ami.

Aŭskultu kaj ripetu: estimi, memori, minuto, matematiko, mem.

Tre ofte "no" kaj "mo" troviĝas en la sama vorto, sed ĝenerale oni ne miksas ilin, nu eble nur ŝerco, ekz. donu al mi vian manon, amikin' - donu al mi vian monon, amikin'!

Aŭskultu kaj ripetu: mono, mano, mentono, monopolo, aŭtonoma, munti, butonumi, komunumo.

Sed ekzistas kelkaj t.n. danĝeraj vortoj, en kiuj oni povas miksi la du parolsonojn, ekz. temo - teno, remo - reno.

Aŭskultu kaj ripetu: ĝemo - ĝeno, animo - anino, temo - teno.

Oni ne miksu "danon kun damo", kaj precipe oni sci, ke ekzistas tute klara diferenco inter "mano kaj mamo!" Se vi ekz. rakontas al iu, ke vi renkontis damon kaj vi salutis ŝin kaj kisis ŝian manon, tiam klare diru manon, sed ne mamon.

Aŭskultu kaj ripetu: masko dum nasko, normo de morno, dorno dum dormo, dormo sen dorno, mano de nano, mano ĉe mamo, nabo sur mapo.

18

En la sekva ĉapitreto ni parolu pri la konsonanto "po". Ni trovas ĝin ekzemple en: multaj konataj vortoj: paco, sapo, kapo. Aŭskultu kaj ripetu: grupo, parto, nepo, parko, supo, gripo, peko. Nu, eble "peko" ne estas ofta vorto, almenaŭ ne por ĉiuj.

En Esperanto estas amaso da vortoj, en kiuj troviĝas eĉ po du "po", ekz. palpi, pipo, pepi, pupo, papo, papago, propra, palpebro.

Laŭ miaj observoj kelkfoje malfacile estas elparolebla la apu-

deco de "po" kaj "to", ekz. akcepti, percepti, volupto, nupto, abrupta, kapti.

Same malfacila por iuj homoj estas la elparolo de "po" en apudeco kun "lo" kaj "ro", ekz. koplo - kopro, kupro - kuplo, supro - suplo.

19

Antaŭ ol prezenti kelkajn prononc-embuskojn, kiuj ligiĝas kun "po", mi nepre devas prezenti la opozician "bo". Ĝi i.a. troviĝas en la vortoj: bela, butero, bona, knabo, febros, afabla, agrabla, trabo.

Ĉi tiu konsonanto estas por kelkaj nacioj malfacila, ĉar ne en ĉiuj lingvoj ĝi ekzistas, ekz. en la finna. La vorto "banko" kiu troviĝas en multaj lingvoj, en la finna estas "pankki". Nu, sed ne nur finnoj povas ĝin misprononci.

Surbaze de miaj observoj de esperantoparolantoj mi konstatis, ke "bo" estas aparte malfacile elparolebla en tiuj vortoj, en kiuj antaŭas ĝin vokalo, ekz. ŝvebi, skribi, aprobi, agrabla, sobra ktp.

Kompreneble ankaŭ rilate al "bo" ekzistas kelkaj embuskoj, la danĝero de mikado kun "po", ekz. anstataŭ diri "paki valizon" iu diras "baki valizon", aŭ inverse, anstataŭ "baki panon" iu povus erare diri "paki panon". Sed por "paki panon" unue oni devas "baki panon".

Se vi estas en zoologia ĝardeno kaj plaĉas al vi "beko", ekz. de birdo, ne diru, ke plaĉas al vi "peko"; same oni ne erarmiksi "pupon", kiu estas vaste konata ludilo-homfiguro kun "pubo", kiu estas laŭ PIV "la malsupra parto de la ventro, ordinare kovrita de haroj". Kompreneble "pupo" povas havi "pubon", se la produktinto de pup-ludilo faris ĝin. En kelkaj kazoj "abelo" povas partopreni en "apelo". Sed eble nur birdaspekta "bebo" povas fari "pepon", pli verŝajne en metafora senco.

Aŭskultu kaj ripetu: pulo sur bulo, kanabo ĉe kanapo, peko pro beko, pubo de bubo, baro por paro.

Kiam sekvas puŝo de buŝo, vi ne ricevos benon pro ĉi tiu peno. Pli reala estas bruno de pruno aŭ bunto de punto.

Ne miksu "bandon kun banto". Cetere "banto" estas ornama nodo, ekz. ĉe kravato. Tial oni diras "buntigi kravaton."

Klara elparolo de "bo" estas necesa ankaŭ en la vortoj, en kiuj ĝi aperas du fojojn, ekz. barbo, bebo, bobeno, bulbo.

Aŭskultu kaj ripetu: peto de beto, kanabo ĉe kanapo.

Laŭvica konsonanto, kiun ni preparolos estas "fo", kiu i.a. troviĝas en la vortoj: kafo, ŝerifo, ŝtofo, fabelo.

Aŭskultu kaj ripetu: frato, fungo, fama, flava, pafi, fajfi, fini.

En iuj vortoj aperas duobla "fo", sed oni elparolu ĉi tiujn vortojn klare, ekz. fajfi, fifro, fotografi.

Por eŭropanoj "fo" estas sufiĉe facila. Verŝajne la sola ebleco de erar-mikso estas tiu kun "vo", ekz. kafo kaj kavo, lafo kaj lavo, pafu kaj pavo. Sed pli ofte erare aŭ mise elparolas ĝin tiuj, kiuj havas malfacilaĵojn ĉe la elparolo de "vo".

La konsonanto "vo" i.a. troviĝas en la vortoj: avo, vazo, mevo, valo, vasta, voĉo, nova, varma, vivi, ŝovi, vojaĝi.

Aŭskultu kaj ripetu: vero pri fero, veo de feo, vesto por festo.

La senvoĉiĝo povas aperi en la vortoj, en kiuj enestas ambaŭ konsonantoj, ekz. "vaflo" (iuj diras 'faflo' anstataŭ vaflo). La senvoĉiĝo sekvas malofte, ankaŭ en la vortoj, en kiuj enestas du "vo", ekz. valvo, volvi, vidvo. Aliflanke tipa asimilo, kiun laŭeble evitu estas trovebla en la vortoj "akvo", "sekvi", do senvoĉa konsonanto senvoĉigas "vo"-konsonanton, ekz. likva, oblikva, relikvo, antikva, kolokvo, kvar, kvin.

Ne forgesu, ke ekzistas diferenco inter "via edzo" kaj "fia edzo". Ne bedaŭru, kiam venas "fino de vino". Klopodu "vidi" por "fidi".

Aŭskultu kaj ripetu: falo en valo, kafo en kavo, kovro de kofro, faro de varo, voko de foko, vero pri fero kaj lafo de lavo.

Atenton! Mi konsterniĝis, kiam dum E-kunveno samideano, kiu posedis vekhoroĵon demandis: "Je kioma horo mi feku vin?" anstataŭ - je kioma horo mi veku vin?

Cetere, ŝerco dirante "unue veko kaj poste feko!"

Neniam inverse.

La konsonanton "jo" ni i.a. trovas en la vortoj: salajro, majo, kajo, ajlo, ajn, sojlo, vojo, ĝojo, juna, justa, jen.

Mi pensas, ke la konsonanto "jo" estas sufiĉe facila, kvankam - sub la influo de tiu aŭ tiu nacia lingvo - oni povas miksi ĝin kun la vokalo "i". Ekz. anstataŭ "mo-za-i-ko" iuj elparolas "mo-zaj-ko", kio ne estas ĝusta, ĉar oni devus diri tute klare "mo-za-i-ko".

La konsonanto "ho" ekzistas en multaj lingvoj, en E-o ni trovas ĝin i.a. en la vortoj: hejmo, halo, hajlo, haŭto, homo, havi. Aŭskultu kaj ripetu: hela, hipokrita, honesta, helpi, substrahi, heziti, hotelo, hundo, herbo, hepato, haveno.

Ni ne forgesu elparoli ĝin precipe en la vortkomenco, kion ofte forgesas francaj e-istoj kaj anstataŭ diri "mi havas la honoron" ili diras "mi avas la onoron". Forlaso de "ho" en la vortkomenco povas ŝanĝi ĝian signifon, ekz. havo - avo, halo - alo, haveno - aveno, horo - oro ktp.

La konsonanto "ho" estas voĉa, sed ja ekzistas en E-o ankaŭ la senvoĉa "ĥo", ekz. eĥo, paroĥo, ŝĥolaro.

Zamenhof loĝis en Bjalistoko, orienta Pollando, kie oni kapblas distingi inter la voĉa kaj senvoĉa ho-ĥo. La loĝantoj de la ceteraj regionoj de Pollando kaj ankaŭ loĝantoj de multaj landoj havas grandajn malfacilaĵojn kaj ofte miksas la du konsonantojn. La aŭtoroj de la "PLena Analiza Gramatiko de Esperanto" aperigis pri tio la jenan rimarkon: "Ekzistas en la ukraina kaj en la rumana unu voĉa ĥ, kies uzado en E-o estas tolerebla, ĉar ĝi ne povas esti konfuzo. Pri la sama temo antaŭ kelkaj jaroj mi intervjuis profesoron John Wells, kiu tiam respondis, ke la mikso de la du ho-konsonantoj estas tolerebla, kondiĉe, ke oni entute memoras elparoli unu el la du konsonantoj, kion precipe memoru la francoj. Zamenhof tamen tuj rimarkis, ke "ĥ" ne ĉiam estas oportuna kaj proponis anstataŭigon de ĉi tiu konsonanto per "ko", ekz. ĥaoso - kaoso, ĥemio - kemio, ĥirurgo - kirurgo, arĥitekto - arkitekto ktp. Nuntempe preskaŭ ĉiujn ĥ-vortojn oni anstataŭigis per k-vortoj, escepte de kelkaj, ekz. jaĥto, eĥo, ĥoro. Por ĉi-lasto vorto oni trovis alian anstataŭigon per "koruso", ĉar ja "koro" estas korp parto.

## 23

Pri la ordinara konsonanto "no" mi jam parolis, nun mi pri-traktos la velaran "ŋo". La ordinara "no" aperas ekz. en la vortoj: nubo, nervoza, kaj la velara "ŋo" - en la vortoj: banko, blanka ktp. Tre ofte oni demandas, kiu el la prononcoj estas ĝusta: "banĥo" au "b-an-ko"?

La kreinto de E-o respondis, ke "batali kontraŭ tia natura emo en la elparolado (tio signifas - emo elparoli velare) ŝajnas al mi afero tute sencela kaj senbezona, ĉar tia elparolado (...) donas nenian malkompreniĝon aŭ praktikan maloportunaĵon". Oni

devas konstati, ke Zamenhof plene pravis, ne ĉar li estis Zamenhof, sed ĉar lia starpunkto estis tute prudenta. Prof. John Wells en sia libro "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" i.a. konstatas: "Fakte ne gravas, ĉu oni diras "banko" au "b-an-ko". Ne povas kreiĝi konfuzo, se oni trovas la prononcon "banko" pli facila kaj sekve uzas ĝin. Ĉar "n" kaj eventuala "ŋ" estas alofonoj de la sama Esperanta fonemo, la diferenco inter ili ne povas havi fonologian valoron."

Laŭ mi plej grava estas tio, ke tia aŭ tia prononco de "no" ne povas ŝanĝi la signifon de tiu aŭ tiu vorto kaj sekve ne povas kaŭzi konfuzon aŭ miskomprenon. Do, estas egale, ĉu oni diras "spongo" au "s-pon-go", "tango" aŭ t-an-go", "venko" aŭ "v-en-ko", "punkto" aŭ "p-unk-to", "fungo" au "f-un-go". Laŭ mi tia eta diferenco en la prononcado ne "no" estas tute tolerebla kaj tute akceptebla, do ni ne trudu al ni mem kaj al aliaj personoj ian tro teorian prononcon ĉi-rilate.

## 24

Venis tempo por diri kelkajn vortojn pri la duonvokalo "ŭ". Ĝi kutime troviĝas post la vokaloj a, e, o, malpli ofte, kutime en derivaĵoj, ĝi troviĝas antaŭ vokalo, ekz. paŭzo, kaŭzo, fraŭlo, neŭtrala, poŭpo, Eŭropo, eŭforio, naŭ, naŭa, kvazaŭa.

Tre malofte, nur por transskribo de geografiaj nomoj, "ŭ" troviĝas en vortkomenco, ekz. Uejhajo, Uuĉango. Aŭskultu kaj ripetu: klaŭno, haŭto, aŭskulti, aŭtenta, laŭta, ankoraŭ, ankaŭ daŭri, bedaŭri.

Diftongojn konsistigas la kombinaĵoj "aj" "ej" k.s. Ekz.: hajlo, mejlo, orgojlo.

## 25

En Esperanto ekzistas 5-vokala sistemo: a, e, i, o, u - do oni ne trudu aliajn vokalsistemojn, kiuj en kelkaj naciaj lingvoj estas pli vastaj. En kelkaj naciaj lingvoj tiu aŭ tiu vokalo dependas de la ĉirkaŭaj konsonantoj, aŭ dependas de la akcento, do oni devas bone memori pri tio, por ne apliki tiujn regulojn rilate al E-o, en kiu ĉiun vokalon oni devus elparoli aparte kaj tre precize.

Por la vokaloj e kaj o oni provis fiksi apartan regulon. Oni proponis alian elparolon de la du vokaloj en fermitaj silaboj, alian en nefermitaj silaboj, pli aŭ malpli vastan. Tian sugeston

ni l.a. trovas en la "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto". Sed praktike ĉi tiu sistemo montriĝis fremda, neakceptebla kiel la unusola aŭ nepre aplikenda. Ĉu do alimaniere oni elparolu "o" kaj "e" en la vortoj - "mo-no kaj mon-do, ve-ni kaj ven-di?"

Prof. John Wells, la plej elstara fakulo pri la E-fonetiko konstatas: "Mia propra opinio estas, ke la menciita regulo por Esperantaj (e, o) povas esti tolerata por tiuj, kies gepatra lingvo konas pli ol tri gradojn de vokala vasteco; sed ke neniel ĝi estu konsiderata kiel deviga. Ĝi ne havas lokon en neŭtrale internacia prononcmaleno". - citaĵo el la jam menciita libro "Lingvistikaj aspektoj...".

Ĉe la elparolado de vokaloj oni tamen devas memori, ke oni ne rajtas engluti ilin aŭ redukti. Do, ekz. januaro estu ĉiam januaro, neniam (!) "januaro". Kaj okcidento - ĉi tiun eraron ofte faras rusoj - ĉiam estu okcidento, neniam akcidento, ĉar ĝi havas tute alian signifon. Same oriento estu oriento, neniam ariento!

26

Ni kelkfrazo prezentu la kombinaĵojn de du vokaloj. Ambaŭ oni devas iomete apartigi, sed sen troigra, por konservi la "fluecon" de la parolado.

La kombinaĵo "ae": aero, aerobiko, aeroplano, aerodromo.

La kombinaĵo "ao": kakao, kaoso, babao, erao, sagao.

La kombinaĵo "ai": balai, hurai.

La kombinaĵo "ui" : vivui, instrui, situi

La kombinaĵo "ei": krei, nei, vei.

La kombinaĵo "oe": poemo, poeto.

La kombinaĵo "oo": heroo, vetoo, protozoo.

La kombinaĵo "eo": muzeo, orkideo, aleo.

La kombinaĵo "ua": repertuaro, eventuale.

La kombinaĵo "uo": statuo, moruo.

La kombinaĵo "ee": ĉeesti, treege.

La kombinaĵo "ii": kopiilo, irigaciilo.

La kombinaĵo "oa": boato, koalicio, oazo.

Kiam du vokaloj troviĝas unu apud la alia, la unua el ili kutime estas elparolata iomete pli longe ol la dua.

Neniam "englutu" unu el la vokaloj, ekz. ne "hero", sed hero-o!

En E-o ekzistas ankaŭ duoblaj konsonantoj (ekz. getto), sed plej ofte ili aperas en kunmetaĵoj, ekz. ellerni, ekkanti, forrabi, ktp. Oni elparolu ilin kune, lom longe, sed sen troigita apartigo, do - ne ek-kanti, sed ekkanti, sennoma ktp.

## 27

La akcento troviĝas sur la antaŭlasta silabo. Ĉi tiu regulo estas tute simpla en la radikvortoj, ekz. bona, bombono, universitato, akuzativo. Ankaŭ en derivaĵoj kreitaj per sufiksoj, ekz.: samideano, samideanino, instruisto, promenejo, ktp.

En la kompleksaj vortoj, kiuj konsistas el radiko kaj antaŭvorto, oni kutimas uzi du akcentojn. La ĉefakcento troviĝas sur la antaŭlasta silabo de la radikvorto, kaj la flankakcento (iom malpli forta) troviĝas sur la antaŭlasta silabo de la radika antaŭvorto, ekz.: kormalsano, monhelpo, telefonaparato, vinbotelo, ktp. La eta apartigo de du konsistigaj elementoj kaj la konservo de flankakcento (malpli forta kompare kun la ĉefakcento) ebligas pli precizan komprenigadon de la pensoj.

Se temas pri la duelementaj vortkunmetaĵoj, kies antaŭvorto estas prefikso, la prefikson oni prefere delikate apartigu disde la ĉefelemento, ekz.: dismeti, fihomo, miskompreno, eniri, foriri, ktp. La regulo rilatas ankaŭ prefiksoidojn.

Aŭskultu kaj ripetu:

makulo, fontano, koloro, planko, ordoni, abstrakta;  
pomkuko, vinbarelo, radikvorto, bananŝelo, industricentro;  
eksministro, praarbaro, postkuri, subtera.

Atenton! Laŭbezone, en multelementaj kunmetaĵoj, oni povas apliki du-tri-kvar flankajn akcentojn, ekz.:

telefonistinidin-ludĉambret-ludilŝranketo. Ufff!

Sed ni tuj substreku, ke E-o ne ŝatas tiajn monstrajn kunmetaĵojn, do evitu ilin. Ja la samon oni povas diri pli simple: ludilŝranketo en ludĉambreto de filino de telefonistino.

## BIBLIOGRAFIO

- K. Kalocsay, G. Waringhien "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto", Rotterdam 1980
- J. Wells "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto", Rotterdam, 1978
- L. Zamenhof "Język międzynarodowy", Varsovio 1887
- A. D. Atanasov (ADA) "La lingva esenco de Esperanto", Rotterdam 1983
- H. Seppik "La tuta Esperanto", Budapeŝto 1983



## TABELO DE LA ENHAVO

Enkonduko .....	1
Zamenhof kaj la prononcado.....	3
La kriterioj de bona prononco.....	4
La elparolo de vokaloj, prononceraroj.....	5
La konsonanto "s".....	7
La konsonanto "z".....	8
La konsonanto "ŝ".....	9
La konsonanto "ĵ".....	10
La konsonanto "c".....	10
La kombinaĵo de la konsonantoj "sc".....	11
La konsonanto "ĉ".....	11
La konsonanto "ĝ".....	12
La konsonanto "r".....	13
La konsonanto "l".....	13
La konsonanto "k".....	14
La konsonanto "g".....	15
La konsonanto "t".....	15
La konsonanto "d".....	16
La konsonantoj "n" kaj "m".....	17
La konsonanto "p".....	17
La konsonanto "b".....	18
La konsonanto "f".....	19
La konsonanto "v".....	19
La konsonanto "j".....	19
La konsonantoj "h" kaj "ĥ".....	20
La velara konsonanto "n".....	20
La duonvokalo "u".....	21
La sistemo de kvin vokaloj en E-o.....	21
Dublaj vokaloj (ae, ao, ai, ui, ei, oe, eo, k.a.)....	22
La akcento.....	23
Bibliografio.....	23

\*

La broŝuron "La Esperanto-fonetiko en praktiko" de Andrzej Pettyn akompanas du sonbendaj kasetoj C-60 kun parol-ekzercoj, kiujn registris per sia voĉo la aŭtoro.

c - kopirajto ĉe Andrzej Pettyn, 05-822 Milanówek,  
P.O.Box - 46, Pollando  
tel. -48-22 - 58-37-08 (hejme)